



# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 30<sup>a</sup> jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k105/k105.html>



**La 28ª de aprilo**

***La hispana baloto: ĉu vi venkis?***

N<sup>o</sup> 105<sup>a</sup>

Junio 2019

# Kajeroj

*Bulteno de la Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj  
(HALE).*

**el la Sudo**  
**Calle Jabonerías, 6.3° D**  
**30010 Murcia**  
**Hispanio**

## Enhavo

Redaktore: okazis!..... 3

Tian Hispanion oni volas..... 5

Alegro magia: intervjuo..... 8

### *La peko de l' Taliban':*

Celo pri korekto..... 11

*La Faraono*, ĉ. 54..... 15

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,  
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun  
artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies  
enhavo mistraktas nenium personon.

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,  
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj  
respondecas ties aŭtoroj, ne la  
redakcio.

Kovrilo: Hispanaj balotoj okazis je la 28<sup>a</sup> de aprilo.

**Pagmaniero:** aliĝu al HALE kontraŭ €5  
jare por ricevi la surpaperan version de  
nia magazino. Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

Nesubskribitajn  
artikolojn verkis  
la redaktoro.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de  
donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi  
kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:  
OpenOffice Writer, Gimp, Scribus, gFtp kaj Bluefish.



## Redaktore **Okazis!**

**F**infine venis balotado en Hispanio, kaj miaj kuncivitanoj amase voĉdonis kaj imponas nun al mi registaron, kiun mi ne volas pro tio, ke neniu popolano simpla, kiel mi, elektis ĝin. Nur politikistoj elektas inter si. Tio ne konvenas al la lando, tio ne konvenas al la popolo. Tio konvenas nur al politikaj partioj kaj ties anoj.

Jam okazis la ĝenerala balotado la 28<sup>an</sup> de aprilo, kaj 75% da hispanoj iris voĉdoni, ne elekti, la listojn da reprezentantoj de la partioj politikaj en la Kongreso de Deputitoj.

La problemoj pri kiuj ni okupiĝas en Hispanio nun ne estas la realaj problemoj, sed tiuj, kiuj la partioj decidu, ke ni preparolu. En demokratio la popolo kontrolas la parlamenton, sed en Hispanio estas la registaro, kaj kompreneble ankaŭ la parlamento, tiuj, kiuj kontrolas la popolon. Kaj kelkaj asertas, ke tio ĉi estas demokratio...

Mi prezentas en supra foto novajn vizaĝojn de la hispana politiko. Mi ne komprenas, ke tiuj feministoj plendante pri la malgranda partopreno de virinoj

en respondecaj postenoj de la vivo hispana tute silentas rilate al kapoj de politikaj partioj. Anstataŭ Pablo Casado, PPn povus gvidi Andrea Levy; anstataŭ Pedro Sánchez, Meriĉel Batet' povus gvidi PSOE-n; anstataŭ Pablo Iglesias, Irene Montero po-



vus gvidi UNIDAS PODEMOS-n; Inés Arrimadas, CIUDADANOS-n; kaj Rocío Monasterio, VOX-n. Eble la elektoj de hispanoj estintus alia, se virinoj finfine saltus al kaplokoj de partioj politikaj. Ili same ne reprezentus la popolon, ĉar demokratio en Hispanio estas ankoraŭ utopio, sed almenaŭ la tiel nomitaj reprezentantoj estus pli agrablaj vidi...

Ĉu ni devus diri, tiukaze, reprezentantinoj? Laŭ mi, tio estus necesa nur se politike ili agus diverse al tio, kion viroj faris ĝis nun kiel prezidantoj. Sed prezidi registaron, gvidi la popolon, plibonigi la estonton de la nacio kaj havi bonajn rilatojn kun amikaj kaj fermdaj nacioj estas io neseke necese markebla, do mi konservos la signi-

fon pri prezidanto kiel tiu, kiu prezidas, kaj se oni agnoskas, ke virinoj faras la saman laboron kun sama efiko kiel viroj, mi opinias, ke jam tempo estas senigini metiojn...

Tio ne signifas, tamen, ke politikistinoj estos pli utilaj ol virpolitikistoj, se la tiel nomita Konstitucio Hispana ne estas ŝanĝita aŭ anstataŭigita de vere demokratia konstitucio. Mi ne estas kontraŭ la reĝo, la kapitalismo, la socialismo, mi estas

### Venas el paĝo 7<sup>a</sup>

Jes, je la deknaŭa jarcento, dum Hispanio estis invadita de *liberama* armeo de Napoleon', Simon' Bolivar', Jozef' de San Martin' kaj aliaj liberigantoj de vicregnoj de Hispanio en Ameriko, alprenis la ideojn pri libereco kaj sendependeco, kaj batalis kontraŭ aliaj amerikanoj, kiuj deziris resti en la krono de Hispanio. Finfine ili venkis, sed devis pagi al angloj pro la helpo dum tiuj militoj, kaj tunoj da oro kaj aliaj riĉecoj oni prenis en Anglujon. La ŝuldon de Peruo, ekzemple, oni finis pagi la sekvintan jarcenton. Jes, la angloj forprenis la oron de Ameriko sen investi multe tie, male al la tricent jara agado de Hispanio en tiu parto de la mondo. Sed nun en tiuj landoj ne mankas tiuj, kiuj diras, ke se Hispanio ne konkerintus ilin, ili parolus la anglan kaj estus en riĉaj landoj samaj kiel Usono. Ili certe ne trovis la ideon, ke la nunaj usonanoj ne estas la praidaro de indianoj sioux', seminoloj, apaĉoj, kaj tiel plu, sed de eŭropanoj, kiuj ekstermis indianojn kaj okupis ties teritoriojn, aŭ venis poste. Jes, la fakto, ke estas tiom multe da mestizoj en la tuta subkontinento venas el fakto, ke hispanoj miksiĝis

kontraŭ neniu politika ideo, sed mi nur estas kontraŭ maldemokratio. Kaj tion ni suferas nun en Hispanio, ĉar ni, la popolo, ne partoprenas en la politikaj decidoj de nia lando, ĉu rekte, ĉu nekrete. Ni nur beas balote ĉiun jarkvaron. Kaj tio estas elekti nenion. Ne nian estonton, ne nian farton, ne nian historion, ne nian agadon.

Mi deziregas ke iam, ĉu viro, cu ino, ebligos al ni elekti, ne bei, nian destinon.

kun lokaj rasoj, kiuj neniam estis amase murditaj. Male, hispanoj haltis la genocidojn, per kiuj kaj inkaoj kaj aztekoj submetis aliajn rasojn kaj tribojn laŭ la kontinento.

Tamen, la **Nigra Legendo** kreita de angloj, nederlandanoj, germanoj kaj italoj (diversintense, certe) prezentas nun nian plej belan agon en la mondo kiel fian, eble pro tio, ke ili neniam kapablis fari ion similan, kaj certe pro nedefendindaj interesoj. Nun oni aŭdas hispanojn paroli kun malestimo pri nia lando, kaj la sopiro, ke ili estu simialj al britoj, francoj, germanoj..., aŭ skandinavo (vikingidoj). Ne, ne mi deziras tian Hispanion. Mi preferas integran landon ol mensogan, genocidan kaj raban, kiu poste diros, ke la kaŭzo de ĉies malbono estas en fremdaj landoj. Tion oni diris en Eŭropo iam por trovi kialon malobei sian imperiestron kaj sendependiĝi. Ankaŭ amerikaj sendependistoj mensogis por atingi siajn celojn. Eĉ se ili, finfine, konstatis, ke tia vojaĝo ruinigis sin kaj siajn landojn.

## ***Tian Hispanion oni volas...***

Lastan monaton, la 28an de Laprilo, okazis baloto, la atendata balotado, kiun Pedro Sánchez promesis organizi tuj, de kiam li ekprezidantiĝis pro la Mocio de Deklaro de Konfido al Registaro de la Popola Partio. Tamen, tio ne okazis tiel. Pro tio, ke PODEMOS kaj naciismaj partioj Maldekstro Respublika de Katalunio (ERC), Partio Demokrata Eŭeop SW KATALUNIO (PDECAT), Naciisma Partio de Vaskolando (PNV) kaj Bildu (radikale naciisma vaska partio) apogis lin dum tiu mocio, li tiam repensis sian pozicion, kaj decidis daŭrigi sian oficon kiel prezidenton ĝis la fino de la regoperiodo, du jarojn pli. Tamen, la apogantoj vidis, ke la prezidento ne plenumis siajn postulojn, kaj pro tio rifuzis daŭrigi sian apogon. Kaj nur pro tio la Prezidento de Hispanio finfine konsentis organizi novan balotadon, ĉar oni ne aprobis la la novan nacian budĝeton.

En la momento, kiam tiu ĉi artikolo estas verkita, jam VOX postulis novan kalkulon de la voĉdonoj, ĉar ili diras, ke ili detektis trompon. Vere, la prognozo de la Centro pri Reserĉoj Sociologia de la Ŝtato (CIS laŭ hispana akronimo) estis tre akurata, kaj la kialo povas esti ekstrema lerteco aŭ trompo. Sed ĉiel ajn, ne miras mi pri la rezulto de la baloto: estas multe da timo en la baza civitano pri ekstrema dekstro, eĉ se tio neniam ekzistis en Hispanio, kaj vere ni suferis

kruelan civilan militon pro la misfaroj de la bedaŭrinde ekzistinta kaj ekzistanta ekstrema maldekstro, PSOE kaj PCE, kiuj serĉis militon en la tridekaj jaroj, sed male al siaj deziroj, ili malvenkis. Sed propagando estas tiom mensoga kaj mensogiga kiel ĉiam, kaj oni devas agnoski, ke maldekstro estas majstraj pri verigi absurdajn mensogojn. Kaj eĉ se hispano kutime reagas al tio, kiam ili neigas sian realon, la bedaŭrinda fakto estas, ke ni reagas tro malfrue, kaj tragika dramo sekvas.

Multaj homoj inter ni kredas, ke Hispanio estas lando kiel iu ajn alia en la mondo. Tamen, tio ne estas vera. Necesis mi viziti Ĉinion, por ke taksiisto surloka atentigis min al io ĝis tiam nerimarkata de mi: *Hispanio estas grava nacio!* Surprize reagis mi: *Ĉu vi jam vizitis la landon?* Li respondis ridete, *Ne, mi ne vizitis, tamen mi scias.* Mi kredis, ke li ne scias pri tio, kion li preparolas, do mi ĝentile reciprokis: *Ankaŭ Ĉinio estas grava lando en la mondo.* Li ridis pli laŭte, kaj asertis sentencon nerespondeblan: *Ho, jes, Ĉinio estas grava pro tio, ke ni estas multaj homoj, sed Hispanio estas grava male al tio, ke vi estas tiom malmultaj!* Mi devas konfesi, ke de tiam tiu ideo marteladas mian kapon, kaj mi tiam lernis alrigardi nin mem per diferenca pensmaniero. Jes, el eksterlando oni vidas nin el alia vidpunkto...

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis tiun mirindan libron de María Elvira Roca Barea, ***Imperiofobio kaj Ni-***

**gra Legendo**, kaj ĝi venigis min al alia libro de usona verkisto Charles Fletcher Lummis (Ĉarz Fleĉer Lamis), **Esploristoj hispanaj de la 16<sup>a</sup> jarcento, Defendo de la kolonianta agado hispana en Ameriko**, per kiu li notigas al ni pri la hispanaj ŝpuroj en Ameriko du jarcentoj antaŭ angloj kuraĝis meti sian piedojn sur la kontinento. Karlo Arkisto diras, ke ne estas malpli meritoplena la agado de hispanoj en la malkovro de Ameriko pro tio, ke piratoj vikingaj estis tie antaŭ li, kio ja estas historie pruvita, pro tio, ke ili malkovris nenion, sed nur forrabis kaj mortigis homojn por gajni monon, kio estas tio, kion piratoj faras. La afero estas, ke vivante la indianoj ĉefe en prahistorio, vikingoj havis ne multe rabi aŭ forrabi. La vojaĝo estis longa kaj danĝera, kaj kaptitoj, kiel malfeliĉe oni konstatis plurajn jarcentojn poste per la sklavigo de afrikanoj nigraj, ne amase supervivis ĝin. Oni nun komencas kompari la agadon de hispanoj kaj angloj en Ameriko, sed oni ne forgesu, ke skandinavo (t.e., vikingoj) estis tie unue, kaj ilia agado ne estis tiom brila kaj homamanta, do la mondo moderna ŝuldas ne tiom multe kiel oni disvendis hodiaŭ bazite sur la ignoranteco hodiaŭa. Oni parolas en Sudeŭropo pri ili kun miro, kiun ili tute ne meritas kaj neniam gajnis.

Hispanoj, male, donacis al Ameriko ĝian ekziston, dekomence. Ili uzis du ilojn tion fari, kiujn oni ne multe valoris dum jarcentoj: lingvo kaj religio. Mi memoras, ke dominikano iam esprimis dankon pro la lingvo, sed ne pro la religio, ĉar ŝajnas, ke nun estas bonorde

kritiki religion, ĉefe se temas pri kristanismo. Sed lingvo hispana ne unuigis eĉ la Iberan Duoninsulon dum jarcentoj da batalado kontraŭ muslimoj, sed Kristanismo estas triopa kaj unuopa samtempe, kaj sekve enhavas la ideon pri integriĝo el diverseco: Dio Patro, Filo, Spirito, kaj la antikvaj geoj romianaj inkluziviĝas en Kristanismon kiel gesanktulojn, eĉ kiel patronoj pri diversaj aferoj, kiel sano, geedzeco, mirakloj, kaj tiel plu... Do, hispanoj regalis Amerikon tutan koncepton pri la mondo, kies anoj indianoj tute ne sciis, ke ili apartenas. De kiam konkeristoj hispanaj aperis tie, miljaraj militoj intertribaj finiĝis, ĉar ili ĉiuj estis anoj de la sama nacio, Hispanio, kaj de la sama religio, Kristanismo, se ili tion decidis. Ĉar, male al tio, kion oni diras de kelkaj jarcentoj, la reĝino Isabel' de Kastilio' mem, decidis, ke indianoj ne estu devigitaj kristaniĝi, se ili tion ne deziris. Eĉ se oni parolas pri kolonioj hodiaŭ, la teritorioj, kiujn hispanaj konkeristoj akiris por la Krono de Kastilio ne estis vere kolonioj, sed provincoj, kiujn oni arigis en vicregnojn, inter kiuj elstaras tiuj de Peruo kaj Nova Hispanio, kiu inkluzivis, ĉi lasta, la tutan nunan Meksikon kaj similgrandajn teritoriojn de nuna Usono, inkluzivante Teksason, Luisjano, Oregono, kaj Kalifornio. Male al la britoj, la reĝo de Hispanio nur postulis por si la kvinonon de la riĉecon kreitan en tiuj landoj, lasante la ceteran kvar kvinonojn por investo kaj profito de la enloĝantoj. Se oni konsideras, ke dum 300 jaroj nur ducent mil homoj (inter ili kvindek mil virinoj)

translokiĝis en Amerikon, oni facile komprenos, ke indianoj ricevis multe pli da riĉeco ol similaj laboristoj en Eŭropo, fakte multe pli ol laboristoj loĝantaj en lando, kiuj nun apartenas al nunaj Germanio aŭ Francio, ekzemple.

Jes, dum tricent jaroj Ameriko konis pacan kunlaboradon neniam antaŭe ĝuitan..., kaj ankaŭ ne poste; ĉar la sendependismaj militoj, kiuj kreis la nunajn sudamerikajn respublikojn, estis aparte sangaj. Indianoj ne partoprenis en ili, kaj kiam oni demandis al ili, ili preferis resti en la krono de Hispanio, kiel Simon' Bolivar' ofte plendis. Tamen, kiam konkeristoj venis en Amerikon indianoj ja helpis ilin forpreni la imperiestrojn de Peruo kaj Meksikio, inkao Atahualpa kaj azteko Moctezuma, respektive. Kial do? Ne forgesu, ke imperion oni kreas kutime pere de sangoversado kaj nejustaj leĝoj por subpremitoj. Sed tiuj indianoj sub la premo de inkaoj kaj aztekoj estis sklavigitaj, kaj suferis murdoferojn al dioj de la regantoj. Hispanoj forigis tiujn kutimojn, kaj aldone konsideris indianojn regatoj de la reĝino de Kastilio kun samaj rajtoj ol tiuj loĝantaj en Ibera Duoninsulo, kaj eĉ pli, ĉar Inkvizicio ne povis juĝi indianojn, nur *regulajn* hispanojn. Kiam Karlo I<sup>a</sup> regis, la konkero kaj cetera aventuroj en Amerikoj estis paralizitaj pro la protestoj de kelkaj monaĥoj, kiel Bartolomeo de las Kasas', kiuj plendis pri maljustoj al indianoj. La Imperiestro mem ordonis tion, ĉar li timis, ke se li ne agis kiel bona kristano, sia animo povus iri en la Enferon. Ĉu oni povus imagi ion similan pri la gereĝoj de Anglujo, Nederlando, Belgio, aŭ iu ajn aliaj landoj, kiuj perforte ruinigis kaj detruis larĝajn partojn de Afriko kaj de Ameriko mem, kiam ili havis la


ŝancon, ĉu tiutempe, ĉu poste?

Bartolomeo de las Kasas estis episkopo de Ĉiapas', Meksikio, dum ses jaroj, sed li estis unu el la malmultaj religiistoj, kiuj ne lernis la lingvojn de indiĝenoj. Li revenis en eŭropan Hispanion, ĉar ne plaĉis al li tiu lando, sed baldaŭ li plendis favore al bonfarto de indianoj, akuzante hispanojn pri krimojn, kiujn li ne povis pruvi. Tamen, oni aŭskultis lian plendon en la **Junta de Valladolid** (Kunveno de Valladolid), kie li havis la ŝancon elmeti siajn kialojn, kiuj estis responditaj de **Hines' de Sepulveda**, filozofo, juristo kaj katolika pastro, kaj liaj konkludoj konvinkis la imperiestron Karlo I<sup>a</sup>, pri tio, ke promocii la kulturon, lingvon kaj religion de Hispanio en Ameriko estis la volo de Dio, kaj sekve la konkero kaj enmeto de tiuj teritorioj en la Kronon de Hispanio ne nur ne estis negativa, sed bona por ĉiuj regatoj liaj. Rilate al nun sanktigita Episkopo de Ĉiapas', oni ne kutime memoras, ke li proponis anstataŭi la indianojn per nigruloj sklavaj venigitaj de Afriko. Tamen en tiuj teritorioj sklavo ne venus dum jarcentoj, kaj nur la Borbonaj Reĝoj, je la fino de la jarcento 18<sup>a</sup> permesis tion. Esas notinde, ke je la jarcento 16<sup>a</sup> hispanoj okupiĝis pri la rajtoj de homo, kiujn oni difinos du jarcentojn poste, okaze de la Franca Revolucio. Sufiĉe por halti konkeron de kontinento, kaj eltiro de tio estis novaj leĝoj por protekti indianojn, kaj devigi vicreĝojn aŭskulti ties plendojn en *Consejo de Indias* (Konsilantaro da Indianoj). Tio finiĝis kun la sendependismo de Sudameriko.

Daŭrigas en paĝo 4<sup>a</sup>

## Alegro Magia

**L**astan numeron ni prezentis la Blogon kaj retpaĝon Allegro Mágico, de Claudia Ortiz. Nun ni prezentas intervjuon al ŝi pri sia muzika agado. Mi esperas, ke la leganto trovos ĝin interesan kaj pensiga.



- 1 **Kiu estas Claudia Ortiz?** Mi estas multe da vortoj: edzino, panjo, podkastintino, blogistino, entreprenistino, meksikano kaj hispanino.
- 2 **Kie vi naskiĝis?** Mi naskiĝis en Puerto Vallarta (pŭerto bajarta), Jalisco (halisko), México (meksi ko).
- 3 **Ĉu vi vivas el muziko, aŭ vi havas alian metion?** Mi vivas el podkastado kaj blogado.
- 4 **Kiun muzikilon vi lernis ludi?** Neniun! (Iomete bekfluton kaj giraron en lernejo, sed pro tio, ke mi memoras nenion, mi sentas, ke tio signifas nenion). Mi lernas pianon, mia tutlongviva deziro. Mi identiĝas kiel persono kiun muziko pasiigas kaj deziras kunhavi ĝin.
- 5 **Kiuj estas viaj preferataj komponistoj?** Mi ne havas preferatan komponiston. Mi preferas ĝenrojn kaj muzikpecojn por koncertaj momentoj, kaj muziko plenigas min per diversaj manieroj. Ekzemple, por koncentriĝi, mi ŝatas "Muzikon por 18 muzikistoj", de Steve Reich; kiam mi

sentas min mem trista, mi aŭskultas la "Duan koncerton por piano de Raĥmaninov", kaj kiam mi estas gaja, mi aŭskultas "La plej altan en la mondo" (Top of the World); de Shonen Knife.

- 6 **Kia vi opinias, ke devas esti la rolo de klasika muzio en lernejoj?** Mi opinias, ke en lernado devus esti devige instrui muzikon (ĝenerale), arton kaj sporton, ĉiam. Tra tiuj tri aksoj kaj bona gvidado, homo kapablas lerni kaj disvolvi disciplinon, kuraĝon, paciencon, respekton, laboron en teamo, kaj ĉefe memkonon.
- 7 **Ĉu kulturo muzika estas pli vasta en Meksiko ol en Hispanio? Kial?** Mi ne havas konkretajn datumajn respondi tiun demandon.
- 8 **Ĉu vi opinias, ke muziko havas socialan valoron?** Kompreneble jes! Muziko respegulas socion; ĝi estas ties idento, kaj kiel tian, oni



devas konstrui ĝin. Muziko kapablas unuigi homojn ĉirkaŭ similan ideon. Muziko estas sociale pova.

**8 Ĉu vi opinias, ke muziko devas esti protektata kaj subvenciata de la ŝtato, ĉu estas preferinde, ke artistoj estu sendependaj?** Pro tio, ke mi ne estas artistino, mi ne povas respondi tiun demandon.

**9 Kiel venis al vi krei blogon pri muziko klasika por infanoj?** De kiam mia plejaĝa filino, Paŭla, naskiĝis, mi deziris kunhavi al ŝi bonan muzikon, ne nur tiun de kantuludu (Cantajuegos) aŭ BabyEinstein (bebinŝtajn, konata lernilo de Disney). Sekve, mi komencis krei ludolistojn pri klasika muziko. Aliflanke, iam mi kune kun edzo ĉeestis koncerton de Yuja Wang kaj Kavakos. La koncerto estis bela, sed kiom da homoj en la aŭskultantaro estis junaj? Tre malmultaj. Mi memoras, ke mi vidis infanon dekdu jaraĝan, kiu dormas, senŝua kaj kun siaj piedoj sur la sidloko. Tio ŝokis kaj tristigis min. Parolinte pri la afero kun edzo, ni venis al konkludo, ke se estus Yuga Wang hispana eble pli da junuloj venus, kaj estus pli da muzika kulturo ĉe ni. "Kaj kial ne estas?", mi demandis. "Kion vi opinias?", li diris. Li sciis, ke estis malfacile por mi trovi manieron kunhavi bonan

muzikon kun Paŭla. La venintan tagon mi vidis averton en interreto pri "Kiel fari vian propran podkaston". Tio estis destino frapante mian pordon, kaj decidis krei mian podkaston kunhavi tiun klasikan muzikon, kiun mi trovis kun Paŭla, kun pli da infanoj.

**10 Ĉu vi ricevis multajn vizitojn?** Dum la monato de aprilo mi havis pli ol 6 000 elŝutoj de la podkasto. Mi ne konsideras, ke ili estas multaj, sed mi kredas, ke ni estas en fazo de atingi pli da familioj.

**11 Kial vi elektis tiun movon de la Sepa Simfonio de Beethoven kiel enirpeco en viajn programojn?** Mi ŝategas "Nodame Cantabile" kaj tiun parton oni uzas en la enkonduko de sia programo. Tio estas okulsignalo al mia gustumo por azia kulturo.

**12 Ĉu vi ricevas helpon fari la programojn, krom via eta filino?** Ne, neniun.

**13 Kiu estis Ĉaj? Ĉu temas pri okulsigno al Piotro Ilyĉ Ĉajkovski?** Jes! Kreante la podkaston mi cerbumas pri kiel atingi la malplej aĝulojn, kaj edzo helpis min dirante "Kial vi ne kreas rolon stelan por via podkasto? Iu, al kiu identiĝu infanoj? Kiel muso, ekzemple?" Kaj ne tiu nur, li ankaŭ provizis la nomon Ĉaj: ni ĵus aŭskultis la "Overturon 1812" de Ĉajkovski kaj mi supozas, ke tio estas la unua

afero, kiun li pripensis.

**14 Kiuj estas viaj planoj por la estonto?** Mia estonta plano estas plifortigi la prezencon de "Allegro Mágico" kaj poste ni vidos.

**15 Ĉu vi intencas verki libron pri via blogo?** Ne, sed mi pensis pri produktado de aŭdlibroj ĉi tiun jaron. Kelkaj gepatroj jam demandis al mi pri tio!

**16 Ĉu vi intencas enkonduki sektion pri kuriozaĵoj aŭ anekdotoj de komponistoj en viaj programoj?** Mi pensis pri tio pri Mozart', kaj fakte en ties paĝo mi havas parton sub lanomo «9 kuriozaĵoj pri Mozart'». Pri la aliaj..., mi ŝatus, sed mi ne havas tempon.

**17 Kiun programon plej kostis al vi fari? Kiu malplej?** Tiu pri

Mozart' kostis al mi laboron fari. Ĝi estis la unua, en kiu mi parolis pri komponisto, kaj mi ankoraŭ ne havis la kreadprocedon tre difinita, kaj aldone mi tiam suferis pri laringito. Malplej laboro..., tiuj pri Ĉaj postulas malplej da tempo kaj laboro.

**18 Ĉu viaj programoj muzikaj, via podkast', estas nur por infanoj?** Intece por infano, sen temoj por plenkreskuloj. Ili estas pensitaj por infanoj. Sed mi trovas, ke ne nur gepatroj, sed ankaŭ geavoj, junuloj, muzikinstruistoj, kaj seninfanaj paroj aŭskultas mian podkaston. Emocias min atingi tiom multe da homoj kun ĉia aĝo. Mi ne povas kredi tion.



## La peko de l' talibani Kvara parto: Benazir: **12 Celo pri korekto.**

**D**um tri tagoj Abdul' Saleh' ne eliris sian domon. Li diris patrinon, ke li ne bone fartas. Ili ankoraŭ estis koleraj kontraŭ li pro tio, kion li instigis, sed ili diris nenion por ne diskuti. Kaj ĉar Abdul' Saleh' estis tre malplialtiĝita kaj li nur emis plori, kion sia patrino ankaŭ ne komprenis. Ĉu eblas, ke la fingro de Dio finfine tuŝis la koron de ŝia filo fanatika?

La kvaran tagon li vekiĝis frue, kaj kiam sia patro estis ĵus ironta labori, li petis lian benon iri al dezerto preĝi kaj peti konsilon de la derviĉo ermito. Ibrahim', timigata, multe surprizis pri tio. Kiam li reagis, li prenis sian filon al imamo de la urbo, kiu aŭdis la knabon private, kaj donis al li vortojn kuraĝigajn:

«Filo, preĝi estas bona. Iru, preĝu, kaj revenu post unu semajno. Se vi ne revenas, vi igos vian patron kaj min iri serĉi vin, kaj ni ne revenos sen vi».

Abdul' Saleh' iris en dezerton serĉi la sanktulon, kaj revenis per si mem antaŭ semajno pasis.

Fakte li estis hejme ses tagojn poste. Antaŭ li revenis, li vizitis la Kampon de Honto, kaj malaperigis la bastonon, kiu signalis la lokon, kie li subterigis Rejinon. La lokon li tenas en sia menso, sed li ne volas, ke iu ajn profanos ŝian restaĵojn. Pli bone forgesitaj ol profanataj.

«Patro, mi parolis multe kun la sankta homo».

«Mi ĝojas, filo. Kion vi decidis fari?»

«Li konvinkis min pri tio, ke mia devo estas helpi vin pri nia familia negoco».

«Mi ĝoje salutas vian decidon, mia filo».

«Ankaŭ, mi decidis edziĝi».

«Mia filo! Ĉu edzo? Tio estas iom subita, ĉu ne?»

«Patro, mi deziras edziĝi al pli juna fratino de Rejin', la virino kiu estis maljuste murdita de mia netoleremo kaj tiu de nia popolo».

Patro mutiĝis. «Filo», li diris kiam li povis denove paroli, «tio estas delikata afero».

«Ne, patro, ni murdis ŝin, kaj ne estas ŝia familio tiu, kiun perdis siajn honoron kaj honton, sed ĉi tiu urbo. Mi volas fari ion por ripari la fiaĵon, kiun mi faris».

«Mi ne scias..., filo. Ili hontas multe. Eble ili forlasos la urbon, kaj komencos vivon en alia loko».

«Tiukaze mi foriros kun ili».

«Kion vi diras?!»

«Patro, mia vivo estas sensencohava ĝis kiam mi korektos tion, kion mi faris malbone».

«Tio vian patrinon kaj min lasas en delikatan lokon».

«Patro, se vi ne deziras peti manon, mi mem faros».

«Atendu, almenaŭ lasu min diskuti la temon kun patrino. Morgaŭ mi diros al vi nian decidon».

La gepatroj de Abdul' Saleh' vizitis tiujn de Benazir' la venontan tagon.

«Dankon pro via vizito», diris Hahim' Aboĉakra, la familiestro. «Neniu vizitas nin de kiam nia kompatinda filino...»

«Pri via filino ni deziras paroli al vi, Hakim', pri via alia filino, Benazir'».

«Kion faris ŝi?»

«Nenion. Nia filo ekenamiĝis al ŝi kaj deziras edziĝi al ŝi».

«Kion?! Ĉu vi ne scias, ke tiu estas hejmo de honto?»

«Ĉu via filo estas Abdul' Saleh'?', interrompois Ajŝin', la patrino de Benazir'.

«Li estas, jes».

«Li estas tiu, kiu denoncis nian kompatindan Rejinon».

«Jes, sed li iris en la dezerton preĝi kaj revenis tre ŝanĝita».

«Mi ne edzinigos mian filinon al murdisto de ŝia fratino», diris la virino. «Preferas mi, ke ŝi restos fraŭla».

«Edzino...», diris ŝia edzo, «ni jam estas maljunaj, kaj neniu petos ŝin pro la honto de nia familio... Ni pripensu tion».

«Neniam!», ŝi diris, ekstarante kaj forlasante la ĉambron.

«Pardonu ŝin», diris la edzo. «Ŝi ankoraŭ doloras pro perdo nia. Ĝi estas tre ĵusa. Malfortuno de Rejin' ne lasas ŝin pensi pri la estonto de Benazir'. Kaj ankaŭ mi miras, ke la akuzanto de Rejin' volas edziĝi al ŝia fratino».

«Jes, sed li estas tre klara pri tio. Ni ne volis veni, sed li konvinkis min. Kion vi respondas?».

«Lasu al mi kelkajn tagojn por ke mi povos konvinki mian edzinon kaj parolos al mia filino. Mi respondos plej eble kiel frue».

Du tagojn poste Hakim' vizitis la vendejon de Ibrahim kaj komunikis ke, kun peno sur sia koro, li ne povas akcepti tion, kion ili demandas de li, ĉar li ne volas altiri pli grandan honton al alia familio, eĉ se temas pri tiu de la akuzinto de lia filino Rejin'.

Kiam Abdul' Saleh' eksciis pri tio, li estis tre malgaja. Li mem iris vidi Hakimon kaj post tre longa konversacio ili interkonsentis renkontiĝi kun Benazir' kaj Ajŝin', kaj poste li informos siajn gepatrojn, se li devos diri ion al ili.

«Abdul' Saleh'», komencis Ajŝin', «tio estas tre neregula. Mi estas ĉi tie nur pro tio, ke mia edzo ordonas tion al mi. Sed kial estas vi ĉi tie?»

«Ajŝin', mi volas edziĝi al via filino».

«Mia filino estas ankoraŭ dekkvarjaraĝa. Ŝi estas infanino. Vi povintus edziĝi al mia alia filino, Rejin', sed vi elektis akuzi ŝin kaj murdigi ŝin. Vi eĉ partoprenis ŝian ŝtonumon, kaj hundoj manĝis ŝin. Kial mi donus al vi mian alian filinon?»

«Mi scias, ho Ajŝin'!, ke vi funebras, doloras, kaj havas kialon malami min. Sed vi ne povas malami min pli ol mi vere malamas min mem», li diris inter siaj larmoj. Mi venigis ruinon al via familio. Permesu al mi, ke mi estu unu el viaj familianoj, kiuj kunhavas vian malfeliĉon, se mi ne povis kunhavi vian feliĉon. Mi scias, ke Rejin' estis bona, ĝentila kaj tre korinklina. Mi scias, ke plaĉis al ŝi grapfrukto kaj ĉio dolĉa, kaj mi scias, ke ŝi kantis tre bele. Ŝi povintus plezuri la plej postuleman edzon...»

«Kiel..., kiel vi scias tion ĉi?»

«De kiam ŝi forlasis nin mi sonĝas pri ŝi ĉiun nokton. Ŝi parolas al mi. Sed hundoj ne manĝis ŝin. La nokton post la tago, kiam ŝi estis murdata, mi venis en la lokon, kaj mi mortigis la ses hundojn, kiujn

mi trovis tie kaj enfosis ilin kune kun la restaĵoj de ŝia korpo. Ŝi kaŝas sub tero, sed ŝi estas tie kompleta».

«Ĉu mia filino parolas al vi en viaj sonĝoj?»

«Tiel okazas, Ajŝin'. Se mi konintus ŝin pli frue, mi sendintus miajn gepatrojn peti de vi ŝian manon».

«Do, kial vi volas edzinigi Benaziron?»


«Benazir' estas juna kaj inteligenta. Ni ne necesas geedziĝi nun, mi povas atendi. Sed tio helpos vin. Via familio estos rehonorigita. Mi provos konvinki ĉiujn pro tio, ke mi eraris. Tiuj fiaj viroj perfortis ŝin, kaj poste akuzis ŝin kiam la juĝisto demandis ilin. Jes, mi scias, li vokis ilin pro tio, ke mi akuzis ŝin. Mi venigis malbonan fortunon sur vian familion, kaj forprenis vian filinon de vi pro tio, ke mi ne efike legis La Libron. Sed mi relegis ĝin pli bone, kaj mi scias nun, ke Dio estas kompatema kaj pioplena, kaj li ne volas, ke ni murdodos inter ni. Sed eĉ se mi forprenis vian filinon, mi povas doni al vi multajn genepojn».

«Kion vi diras?», demandis tiam Hakim' al sia filino.

Ŝi rigardis al li, levigante siajn okulojn de la planko, kaj per tre dolĉa voĉo, ŝi diris: «Mi diras kiel vi diros, patro. Mi komprenas nenion».

«Abdul' Saleh', diru al viaj gepatroj, ke ni daŭrigos nian konversacion post tri tagoj, je ĉi tiu horo».

La gastiganto ekstaris, kaj la vizito finiĝis. Abdul' Saleh' staris, ankaŭ, kaj post reverenco al ĉiu el ili tri, li forlasis la domon.



## La Faraono

Ĉapitro 54<sup>a</sup>

Tiel do en la monato Hator, post tridek kvar jaroj de regado, mortis la faraono Mer-amen-Ramzes XII, la sinjoro de la du mondoj, la estro de la eterneco, la disdonanto de la vivo kaj de ĉia ĝojo.

Li mortis, ĉar li sentis, ke lia korpo fariĝas malforta kaj senutila. Li mortis, ĉar li sopiris al la eterna patrujo, kaj la regadon de la tera ŝtato li deziris konfidi al pli junaj manoj. Fine, li mortis, ĉar li tiel deziris, ĉar tia estis lia volo. La dia spirito forflugis, kvazaŭ akcipitro, kiu longe rondflugante super la tero, perdiĝas fine en la blua spaco.

Kiel lia vivo estis ĉeesto de senmorta estaĵo en la lando de la vanteco, same lia morto estis nur unu el la momentoj de superhoma estado.

La sinjoro vekiĝis ĉe la leviĝo de l' suno kaj apogita sur du profetoj, ĉirkaŭita de pastroj, iris en la kapelon de Oziriso. Kiel ĉiutage, li revivigis la dion, lavis kaj vestis lin, faris oferon kaj levis la manojn por la preĝo.

Dume la pastroj kantis:

Ĥoro I. — Honoro al vi, kiu leviĝas sur la horizonto kaj trakuras la ĉielon.

Ĥoro II. — La vojo de via sankteco estas la feliĉo de tiuj, sur kies vizaĝojn falas viaj radioj...

*Ĥoro I. — Ĉu vi povus iri, kiel vi iras, sen halto, ho suno?...*

*Ĥoro II. — Granda migrulo de la spaco, vi, kiu ne havas sinjoron kaj por kiuj centoj da milionoj da jaroj estas nur unu palpebrumo...*

*Ĥoro I. — Vi subiras, sed vi daŭras. Vi multobligas la horojn, noktojn kaj tagojn, kaj vi mem daŭras laŭ viaj propraj leĝoj...*

*Ĥoro II. — Vi lumigas la teron, oferante vin mem per viaj propraj manoj, kiam en la figuro de Ra vi leviĝas sur la horizonto.*

*Horo I. —Ho stelo, kiu aperas, granda per via lumo, vi mem formas viajn membrojn...*

*Horo II. —Kaj naskita de neniŭ, vi naskas vin mem sur la horizonto.*

En tiu momento la faraono ekparolis:

*"Ho vi, radianta sur la ĉielo! Permesu al mi eniri en la eternecon, kuniĝi kun la respektindaj kaj perfektaj ombroj de la supera lando. Kun ili mi rigardu viajn brilojn matene kaj vespere, kiam vi kuniĝas kun via patrino Nut. Kaj kiam vi turnos vian vizaĝon al la okcidento, leviĝu miaj manoj por la preĝo, por honori la vivon, ekdormantan post la montoj." [Himno aŭtentika]*

Tiel kun la manoj levitaj al la ĉielo, parolis la sinjoro, ĉirkaŭita de la nuboj de l' incensoj. Subite li eksilentis, kaj falis posten en la brakojn de l' asistantaj pastroj.

Li ne vivis plu.

La novaĵo pri la morto de la faraono kiel fulmo trakuris la palacon. La servistoj forlasis siajn okupojn, la estroj ĉesis kontroli la sklavojn, oni alarmis la gvardion kaj okupis ĉiujn enirojn.

En la ĉefa korto komencis kolektiĝi la amaso: kuiristoj, ĉevalistoj, kelistoj, virinoj de lia sankteco kaj iliaj infanoj. Unuj demandis, ĉu tio estas vera, aliaj miris, ke la suno lumas ankoraŭ sur la ĉielo, kaj ĉiuj kune kriis ĝis perdo de l' spiro:

—Ho sinjoro!... Ho nia patro!... Ho amata!... Ĉu eble estas, ke vi jam forlasis nin?... Ho jes, li jam iras al Abidos!... Al la okcidento, al la okcidento en la teron de la justuloj!... La loko, kiun vi amis, ĝemas kaj ploras!...

Terura krio eksonis en ĉiuj kortoj, en la tuta parko. Ĝi resaltis de la orientaj montoj, la vento portis ĝin sur siaj flugiloj trans Nilon, kaj ĝi ektimigis la urbon Memfison.

Dume la pastroj preĝante metis la korpon de la mortinto en riĉa, fermita portilo. Ok pastroj stariĝis ĉe la teniloj, kvar prenis en la manojn ventumilojn el strutaj plumoj, aliaj incenson kaj prepariĝis eliri.



En ĉi tiu momento alkuris la reĝino Nikotris, kaj ekvidinte la korpon jam en la portilo, sin ĵetis al la piedoj de l' mortinto.

- Ho mia edzo, ho mia frato, ho mia amata!... —kriis ŝi, dronante en la larmoj. —Ho amata, restu kun ni, restu en via domo, ne foriru de la loko sur la tero, en kiu vi estas...
- En paco, en paco, al la okcidento —kantis la pastroj —ho granda monarĥo, iru en paco al la okcidento...
- Ho ve! —diris la reĝino —vi rapidas al la rivero, por transiri sur la alian bordon! Ho pastroj, ho profetoj ne rapidu, lasu lin; vi ja revenos hejmen, sed li iros en la landon de la eterneco...
- En paco, en paco, al la okcidento!... —kantis la pastra ĥoro.  
—Se plaĉos al Dio, kiam venos la tago de la eterneco, ni ree ekvidos vin, ho sinjoro, ĉar vi jen iras en la landon, kiu kunigas ĉiujn homojn.

La respektinda Herhor donis signon. La servistinoj superforte forŝiris la reĝinon de la piedoj de l' faraono kaj kondukis ŝin en ŝian ĉambron.

La portilo, portata de la pastroj, ekmoviĝis; la estro estis vestita kaj ĉirkaŭita, kiel dum la vivo. Dekstre kaj maldekstre, antaŭ kaj post li iris: generaloj, kasistoj, juĝistoj, grandaj skribistoj, portantoj de la hakilo kaj sago, kaj, antaŭ ĉio, granda amaso de pastroj de ĉiuj rangoj.

En la korto la servistoj falis sur la vizaĝon, ĝemante kaj plorante, la armeo prezentis la armilojn kaj eksonis trumpetoj, kvazaŭ por saluti reĝon vivantan.

Kaj efektive la sinjoro kvazaŭ vivanta estis portata al la rivero. Kiam oni atingis Nilon, la pastroj starigis la portilon sur orita ŝipo, sub purpura baldakeno, kiel dum lia vivo.

Tie oni superŝutis la portilon per floroj, kontraŭ ĝi oni starigis la statuon de Anubis, kaj la reĝa ŝipo ekiris al la alia bordo de Nilo. La estron adiaŭis la ploroj de l' servistoj kaj kortegaj virinoj.

Du horojn de la palaco, trans Nilo kaj trans la kanaloj, fruktoportaj kampoj kaj palmaj arbaroj, inter Memfiso kaj "Plata Altaĵo de Mumo" kuŝis stranga kvartalo. Ĉiuj ĝiaj konstruaĵoj estis destinitaj por la mortintoj, kaj loĝataj nur de kolŝitoj kaj paraŝitoj, kiuj enbalzamigadis la kadavrojn.

La kvartalo estis kvazaŭ vestiblo de la vera tombejo, ponto, kiu kunigis la vivantan socion kun la loko de la eterna ripozo. Tien estis alportataj la mortintoj kaj estis farataj el ili mumoj; tie la familioj marĉandis kun la pastroj pri la prezo de l' enterigo. Tie estis preparataj la sanktaj libroj kaj zonoj, ĉerkoj, mebloj, vazoj kaj statuoj por la mortintoj.

—Kiu venis? —oni demandis de interne.

—Oziriso Mer-amen-Ramzes, la sinjoro de du mondoj, venas al vi kaj postulas, ke vi preparu lin al la eterna vojaĝo —respondis —la pastro.

—Ĉu estas eble, ke estingiĝis la suno de Egipto?... Ke mortis tiu, kiu mem estis la spiro kaj vivo?...

—Tia estis lia volo —respondis la pastro. —Akceptu do la sinjoron kun konvena respekto kaj faru al li ĉiujn servojn, por ke ne frapu vin punoj en ĉi tiu kaj en la estonta vivo.

—Ni faros, kiel vi deziras —respondis la voĉo.

Nun la pastroj lasis la portilon apud la pordo kaj rapide foriris, por ke ne falu sur ilin la malpura spiro de la kadavroj, amasigitaj en ĉi tiu loko. Restis nur la civilaj oficistoj, komandataj de la granda juĝisto kaj kasisto.

Post sufiĉe longa momento de l' atendado, la pordego malfermiĝis, kaj eliris el ĝi dekelko da homoj. Ili havis pastrajn vestojn kaj kovritajn vizaĝojn.

Vidante ilin, la juĝisto diris:

—Ni transdonas al vi la korpon de sinjoro via kaj nia. Faru kun ĝi, kion ordonas nia sankta religio, malzorgu nenion, por ke la granda mortinto ne estu per via kulpo maltrankviligita en la alia mondo.

La kasisto aldonis:

—Uzu oron, arĝenton, malakiton, turkisojn, jaspisojn, smeraldojn kaj plej multekostajn parfumojn por ĉi tiu sinjoro, por ke nenio manku al li kaj por ke li havu ĉion de la plej bona kvalito. Tion diras al vi mi, la kasisto. Kaj se troviĝus malnoblulo, kiu anstataŭ noblaj metaloj volus meti mizerajn falsaĵojn, kaj anstataŭ multekostaj ŝtonoj fenician vitron, li memoru, ke oni dehakos al li la manojn kaj elŝiros la okulojn.

—Estos farite, kiel vi postulas —respondis unu el la vualitoj.

La aliaj levis la portilon kaj eniris kun ĝi en la kvartalon de la mortintoj, kantante:

—Vi iras en paco al Abidos!... Atingu en paco la teban okcidenton!... Al la okcidento, al la okcidento, al la tero de la justuloj!...

La pordego fermiĝis, kaj la plej alta juĝisto kaj la oficistoj, akompanantaj lin, revenis al la rivero kaj palaco.

Dume la vualitoj transportis la portilon en grandegan konstruaĵon, kie oni enbalzamigadis la kadavrojn de l' reĝoj kaj de tiuj altranguloj, kiuj akiris specialan favoron de l' faraono. Ili haltis en la vestiblo, kie staris ora ŝipeto sur malgrandaj radoj, kaj komencis elpreni la mortinton el la portilo.

—Rigardu! —ekkriis unu el la vualitoj —ĉu ili ne estas ŝtelistoj?... La faraono ja mortis en la kapelo de Oziriso, li do devis esti en solena vesto... Kaj jen ĉi tie: anstataŭ oraj braceletoj —kupraj, la ĉeno ankaŭ estas kupra kaj en la ringoj estas falsitaj ŝtonoj... Mi dezirus scii, kiu tiel servis lin, la pastroj aŭ la skribistoj?

—Certe la pastroj... Friponoj, sekiĝu viaj manoj!... Kaj tiaj friponoj kuraĝas admoni nin, ke oni donu al la mortinto ĉion de la plej bona kvalito...

—Ne ili postulis, sed la kasisto...

—Ili ĉiuj estas ŝtelistoj...

Parolante tiel, ili demetis de la mortinto la reĝajn vestojn, surmetis al li negliĝan robon, broditan per oro kaj transportis la kadavron en la ŝipeton.

—Ni danku la diojn —diris unu el la vualitoj —ke ni jam havas novan sinjoron. Ĉi tiu faros la ordon kun la pastraro... Kion ili prenis per la manoj, tion ili redonos per la buŝo...

—Oni diras, ke tio estos severa estro —respondis alia. —Li estas en bonaj rilatoj kun Fenicianoj, amas la societeton de Pentuer, kiu ja ne devenas de la pastroj, sed de tiaj mizeruloj, kiel ni... Kaj la armeo, oni diras, lasus sin bruligi kaj dronigi por la nova faraono...

—Kaj en la lastaj tagoj li glorie venkis la Libianojn...

—Kie li estas, ĉi tiu nova faraono?... —demandis alia. —En la dezerto!... Mi timas, ke antaŭ lia reveno okazos al li ia

malfeliĉo...

—Kion oni povas fari al li, se post li staras la armeo! Mi ne ĝisvivu bonan enterigon, se la juna sinjoro ne faros kun la pastroj, kiel la rinocero kun la tritiko...

—Vi malsaĝulo —intermetis alia, kiu silentis ĝis nun. —La faraono venkos la pastrojn?...

—Kial ne?...

—Ĉu vi vidis iam leonon, kiu disŝiris piramidon?...

—Kion vi babilas!

—Aŭ rinoceron, kiu ĝin renversis?

—Kompreneble, ĝi ne povas tion fari.

—Kaj la ventego?

—Ĉu la diablo inspiris al vi hodiaŭ la demandojn?...

—Bone, mi do diras al vi, ke leono, rinocero aŭ vento pli facile renversos piramidon, ol la faraono venkos la pastraron... Eĉ se la faraono estus leono, rinocero kaj vento en unu persono...

—Vi, malsupre!... —oni kriis de supre. —Ĉu la mortinto jam estas preta?

—Jam... Jam... nur lia makzelo refalas —oni respondis el la vestiblo.

—Indiferente... Rapide donu lin ĉi tien, ĉar Izido post unu horo devas iri en la urbon.

Post momento la ora ŝipeto kun la kadavro estis per ŝnuroj levita supren, sur la eksteran balkonon.

El la vestiblo oni eniradis en grandan salonon, blue kolorigitan kaj ornamitan per flavaj steloj. Sur la tuta longo de la salono al unu el la muroj estis alkrōĉita kvazaŭ balkono, arkforma, kies ekstremoj leviĝis unu etaĝon, la mezo unu kaj duonon.

La salono prezentis la ĉielan firmamenton, la balkono la vojon de la suno sur la ĉielo, kaj la faraono devis esti Oziriso, aŭ la suno, kiu iras de la oriento al la okcidento.

Malsupre staris amaso da pastroj kaj pastrinoj, kiuj, atendente la solenon, parolis pri indiferentaj aferoj.

—Preta!... —oni kriis de la balkono.

La interparoladoj eksilentis. Supre trifoje eksonis bronza lado kaj sur la balkono aperis la orita ŝipeto de la suno, en kiu veturis la mortinto.

*"Jen li aperas en nuboj, por apartigi la ĉielon de la tero, kaj poste kunigi ilin..."*

*"Senĉese kaŝita en ĉiu objekto, li estas la sola vivanta, en kiu eterne ekzistas ĉiuj aferoj..."*

La ŝipeto iom post iom leviĝis al la mezo de la arko kaj fine haltis sur la supro.

Tiam sur la malsupra ekstremo de l' arko aperis pastrino, alivestita, kiel la diino Izido, kun la filo Horus, kaj same malrapide komencis supreniri. Tio estis la bildo de la luno, kiu sekvas la sunon.

Nun la ŝipeto de la supro de l' arko komencis malleviĝi al la okcidento, kaj malsupre ree eksonis la ĥoro:

*"Dio, enkorpigita en ĉiuj objektoj, spirito Ŝu en ĉiuj dioj. Li estas la korpo de la vivanta homo, kreinto de la arbo, kiu portas fruktojn, li estas la kaŭzo de la fruktigaj superakvoj. Sen li nenio vivas en la tera spaco."*

La ŝipeto malaperis sur la okcidenta ekstremo de la balkono, Izido kun Horus haltis sur la supro de la arko. Tiam al la ŝipeto alkuris aro da pastroj: ili elprenis la kadavron de l' faraono, metis ĝin sur marmora tablo, kvazaŭ Ozirison por ripozo post la taga laboro.

Nun al la mortinto proksimiĝis paraŝito, alivestita kiel la dio Tifono. Sur la kapo li havis teruran maskon kaj frizitan flavruĝan perukon, sur la dorso haŭton de apro, kaj en la mano ŝtonan etiopian tranĉilon.

Li komencis rapide detranĉi la plandojn de la mortinto.

—Kion vi faras al la mortinto, frato Tifono? —demandis lin Izido de la balkono.

—Mi skrapas la piedojn de mia frato Oziriso, por ke li ne malpurigu la ĉielon per la tera polvo —respondis la paraŝito, alivestita kiel Tifono.

Fortranĉinte la plandojn, la paraŝito prenis kurban metalfadenon metis ĝin en la nazon de l' mortinto kaj komencis eltiri la cerbon. Poste li distranĉis la ventron kaj tra la truo rapide eltiris la intestojn, koron kaj pulmojn.

Dume la helpantoj de Tifono alportis kvar grandajn urnojn, ornamentajn per la kapoj de l' dioj: Hape, Emset, Duamutf kaj Kebhsneuf, kaj en ĉiun el la urnoj metis iun internan organon de l' mortinto.

—Kion vi faras tie, frato Tifono? —demandis duan fojon Izido.

—Mi purigas mian fraton Ozirison de la teraj aferoj, por ke li fariĝu pli bela —respondis la paraŝito.

Apud la marmora tablo estis laĝeto, kies akvo estis saturita per sodo.

La paraŝitoj, puriginte la kadavron, ĵetis ĝin en la laĝeton, en kiu ĝi devis malsekiĝi sepdek tagojn.

Dume Izido, trairante la tutan balkonon, proksimiĝis al la ĉambro, en kiu la paraŝito ĵus malfermis kaj purigis la reĝajn restaĵojn. Ŝi demandis terurita:

—Kie estas mia frato?... kie mia dia edzo?...

Subite ektondris, eksonis trumpetoj kaj bronzaĵoj, kaj la paraŝito, alivestita kiel Tifono, eksplodis de rido kaj ekkriis:

—Bela Izido, kiu kun la steloj gajigas la noktojn, ne ekzistas plu via edzo!... Neniam plu la radianta Oziriso sidiĝos sur la orita ŝipeto, neniam plu la suno sin montros sur la firmamento... Mi faris tion, mi Set kaj mi kaŝis lin tiel profunde, ke neniu dio, eĉ ĉiuj kune ne retrovos lin!...

Ĉe tiuj vortoj la diino disŝiris la vestojn, komencis ĝemi kaj elŝiri siajn harojn, Ree eksonis la trumpetoj, tondroj kaj sonoriloj, inter la pastroj kaj pastrinoj leviĝis murmureto, poste krio, malbenoj kaj fine ĉiuj ĵetis sin sur Tifonon, kriante:

—Malbenita spirito de la mallumo!... Vi, kiu ekscitas la ventojn de l' dezerto, boligas la maron, kovras la teran lumon!... Falu en senfundaĵon, el kiu ne povus vin liberigi eĉ la patro de l' dioj... Malbenita, malbenita Set!... Via nomo estu teruro kaj abomeno!...

Tiel malbenante, ĉiuj ĵetis sin kun pugnoj kaj bastonoj sur Tifonon; la malbela dio komencis forkuri kaj fine malaperis el la

salono.

Ree tri sonoj de la bronza lado, kaj la soleno estis finita.

—Sufiĉe! —ekkriis la plej maljuna pastro al la aro, kiu jam efektive komencis interbatali. —Vi, Izido, povas iri en la urbon, la ceteraj al aliaj mortintoj, kiuj atendas nin... Ne malzorgu la simplajn mortintojn, ĉar ni ne scias, kiel oni pagos al ni por ĉi tiu...

—Certe ne multe! —intermetis la paraŝito. —Oni diras, ke en la trezorejo restis nenio, kaj Fenicianoj minacas, ke ili ĉesos pruntedoni, se ili ne ricevos novajn rajtojn...

—La morto ekstermu viajn Fenicianojn!... Baldaŭ oni devos almozpeti de ili hordean panon; ĉion ili jam proprigis al si...

—Sed se ili ne donos monon al la faraono, ni ricevos nenion por la enterigo...

Iom post iom eksilentis la interparoladoj kaj la ĉeestantoj forlasis la bluan salonon. Restis nur gardistoj ĉe la lageto kun la restaĵoj de l' faraono.

La tuta soleno, prezentanta la mortigon de Oziriso (la suno) per Tifono (la dio de la mallumo kaj krimo) servis, por distranĉi kaj purigi la restaĵojn de l' faraono, kaj tiel prepari ilin por la enbalzamigo.

Sepdek tagojn la mortinto kuŝis en la akvo, saturita per sodo, kredeble kiel rememoraĵo, ke la malbona Tifono dronigis la korpon de l' frato en Sodaj Lagoj. Dum la tuta tempo, matene kaj vespere, la pastrino, alivestita kiel Izido, venis en la bluan salonon. Tie, ĝemante kaj elŝirante al si la harojn, ŝi demandis la ĉeestantojn: ĉu oni vidis ŝian dian edzon kaj fraton?

Kiam pasis la tempo de la funebro, Horus, la filo kaj posteulo de Oziriso aperis en la salono kaj li, fine, rimarkis la banujon.

—Eble ĉi tie oni devus serĉi la restaĵojn de mia patro kaj frato?  
—demandis Horus.

Ili komencis serĉi, trovis kaj, kun granda ĝojo de l' pastroj, ĉe sonoj de la muziko elprenis la korpon de la faraono el la fortiga bano.

Oni enmetis la korpon en ŝtonan tubon, tra kiu dum kelke da

tagoj pasis varmega aero, kaj sekiginte oni transdonis al la enbalzamigistoj.

Nun komenciĝis la plej gravaj ceremonioj, kiujn sur la faraono plenumis la plej altaj pastroj de la kvartalo de l' mortintoj.

La korpon de la mortinto, turninte la kapon al la sudo, oni lavis per sanktigita akvo, kaj ĝian internon per palma vino. Sur la planko, surŝutita per cindro, sidis larmistinoj, kaj elŝirante al si la harojn, gratante al si la vizaĝojn, ploris la mortinton. Ĉirkaŭ la funebra lito kolektiĝis pastroj, alivestitaj kiel dioj: Izido, nuda, kun la krono de l' faraonoj, la junulo Horus, Anubis kun ŝakala kapo, Tot, kun birda kapo kaj kun tabuletoj en la mano, kaj multaj aliaj.

Sub la kontrolo de ĉi tiu respektinda aro, specialistoj komencis plenigi la internon de l' mortinto per forte odorantaj herboj, seĝaĵoj, kaj eĉ ili verŝis tien odorajn arbajn sukojn, seninterrompe preĝante. Poste, anstataŭ liaj propraj, oni metis al li vitrajn okulojn, enkadrigitajn en bronzo.

Oni surŝutis la tutan korpon per soda pulvoro.

Nun elpaŝis alia pastro kaj klarigis al la ĉeestantoj, ke la korpo de l' mortinto estas la korpo de Oziriso kaj liaj ecoj estas la ecoj de Oziriso: la miraklaj ecoj de lia maldekstra tempio estas la ecoj de la tempio de l' dio Tumu; lia dekstra okulo estas la okulo de l' dio Tumu, kies radioj trapenetas la mallumon. Lia maldekstra okulo estas la okulo de Horus, kiu ekstermas ĉiujn vivantajn kreaĵojn; la supra lipo estas Izido, la malsupra —Neftis. La kolo de l' mortinto estas diino, la manoj estas diaj animoj, la fingroj estas ĉielaj serpentoj, la filoj de l' diino Selkit. Liaj flankoj estas du plumoj de Amon, la dorso estas la spino de Sibū, la ventro estas la flanko de Nue. [Maspero]

Alia pastro diris:

—Oni donis al mi buŝon por paroli, piedojn por paŝi, manojn por faligi la malamikojn. Mi reviviĝas, mi ekzistas, mi malfermas la ĉielon; mi faras tion, kion oni ordonis al mi en Memfiso.

Dume sur la kolo de l' mortinto oni pendigas bildon de skarabo, faritan el multekosta ŝtono, kun surskribo:



*"Ho mia koro, kiun mi ricevis de mia patrino; ho mia koro, kiun mi havis, kiam mi estis sur la tero, ne leviĝu kaj ne atestu kontraŭ mi en la tago de la juĝo."*

Nun ĉiun manon kaj piedon, ĉiun fingron de l' mortinto oni ĉirkaŭvolvis per rubandoj, sur kiuj estis skribitaj preĝoj kaj ĵuroj. Sur la brusto kaj kolo oni metis tutajn manuskriptojn de "la libro de l' mortintoj", kun la sekvantaj meditoj, kiujn la pastroj voĉe legis super la mortinto:

*"Mi estas tiu, kontraŭ kiu neniu dio starigas barojn.*

*Kiu li estas?*

*Li estas Tum sur la ŝildo, li estas Ra sur la ŝildo, kiu leviĝas en la okcidento de la ĉielo.*

*Mi estas Hieraŭ kaj mi konas la Morgaŭon.*

*Kiu li estas?*

*Hieraŭ estas Oziriso, Morgaŭ estas Ra, en la tago, kiam li detruos la malamikojn de l' Sinjoro, kiu estas super ĉio, kaj kiam li oferos sian filon Horuson. Per aliaj vortoj: en la tago, kiam la ĉerkon de Oziriso renkontos lian patron Ra, Li venkos la diojn, laŭ la ordono de Oziriso, la sinjoro de la monto Amenti.*

*Kiu li estas?*

*Amento estas kreaĵo de la animoj de l' dioj, laŭ la ordono de Oziriso, la sinjoro de l' monto Amenti. Per aliaj vortoj: Amenti estas la ekscito, kaŭzita de Ra; ĉiu dio, kiu venas tien, batalas. Mi konas grandan dion, kiu loĝas tie.*

*Mi estas de mia lando, mi venas de mia urbo, mi detruas la malbonon, forigas tion, kio restas ne bona, kaj forpuŝas de mi la malpuraĵon. Mi atingas la landon de la ĉielanoj, mi eniras tra potenca pordego.*

*Ho, vi, kunuloj, donu al mi la manon, ĉar mi estos unu el Vi."*

Kiam ĉiu membro de la mortinto jam estas ĉirkaŭvolvita per la

rubandoj, kaj armita per amuletoj, kiam li jam posedas sufiĉan provizon da meditoj, kiuj permesos al li sin orienti en la lando de l' dioj, oni devas zorgi pri la dokumento, kiu malfermos al li la pordegon de tiu lando.

Ĉar inter la tombo kaj la ĉielo la mortinton atendas kvardek du teruraj juĝistoj, kiuj sub la prezido de Oziriso esploras lian teran vivon. Nur kiam la koro de la mortinto, metita sur la pesilon de la justeco, montriĝos egala al la diino de la vero, kaj kiam la dio Dutes, notanta sur tabuletoj la agojn de l' mortinto, juĝos ilin bonaj, nur tiam Horus prenas la animon je la mano kaj kondukas antaŭ la tronon de Oziriso.

Por ke la mortinto povu sin senkulpigi antaŭ la tribunalo, oni devas involvi lian mumon en papiruson, sur kiu estas skribita lia ĝenerala konfeso. Dum la envolvado la pastroj diras laŭte kaj klare, por ke la mortinto nenion forgesu:

*"Estroj de la vero, mi alportas al vi nur la veron. Al neniu homo mi faris perfide malbonon, nenium el miaj proksimuloj mi faris malfeliĉa... Neniam mi estis maldeca, neniam mi diris maldecan vorton en la domo de la vero. Mi ne estis intima kun la malbono. Mi ne faris malbonon. Kiel estro mi ne ordonis al miaj subuloj labori super iliaj fortoj. Neniu per mia kulpo fariĝis timema, mizera, suferanta, malfeliĉa. Mi faris nenion, kion malestimus la dioj. Mi ne turmentis la sklavojn. Mi ne lasis ilin malsataj. Mi ne igis ilin plori. Mi ne mortigis. Mi ne ordonis mortigi perfide. Mi ne mensogis. Mi ne rabis la trezorojn de la temploj. Mi ne malgrandigis la enspezojn, oferitajn al la dioj. Mi ne ŝtelis panon, nek zonojn de la mumoj. Mi ne pekis kontraŭ la pastro de mia distrikto. Mi ne forprenis, nek malgrandigis lian havon. Mi ne forŝiris la infanon de la brusto de ĝia patrino. Neniam mi agis brute. Mi ne uzis falsan pesilon. Mi ne kaptis birdojn. Mi ne malhelpis la leviĝon de la akvo. Mi ne deturnis la fluon de la kanaloj. Mi ne estingis la fajron en nekonvena momento. Mi ne ŝtelis la oferojn de la dioj, kiujn ili elektis. Mi estas pura... Mi estas pura... Mi estas pura..."* [Ĉapitro 75-a de La libro de l' mortintoj. Tio estas unu el la plej altideaj dokumentoj, kiujn lasis la ni

*la antikva mondo.]*

Kiam la mortinto, dank' al "La Libro", jam sciis, kiel agi en la eterna lando, kaj, antaŭ ĉio, kiam li sciis, kiel senkulpigi sin antaŭ la tribunalo de la kvardek du dioj, tiam la pastroj armis lin ankaŭ per la antaŭparolo de ĉi tiu libro kaj klarigis al li ĝian grandan gravecon.

Por tiu celo la enbalzamigistoj, ĉirkaŭantaj la freŝan mumon de l' faraono, foriris, kaj venis la ĉefa pastro de la distrikto kaj murmuretis al la mortinto en la orelon:

*"Sciu, ke posedante ĉi tiun libron, vi apartenos al la vivantoj kaj akiros grandan influon ĉe la dioj. Sciu, ke dank' al ĝi neniuj kuraĝos kontraŭstari al vi. La dioj mem proksimiĝos al vi kaj ĉirkaŭprenos vin, ĉar vi apartenos al ilia rondo."*

Sciu, ke la libro permesos al vi ekscii, kio estis en la komenco. Neniu homo publikigis ĝin, neniu okulo ĝin vidis, neniu orelo ĝin aŭdis. La libro estas la vero mem, sed neniuj konis ĝin, kaj neniam. Estu ĝi videbla nur por vi kaj por tiu, kiu ĝin al vi donis. Ne aldonu al ĝi komentariojn, kiujn povus dikti via memoro aŭ via fantazio. Ĝi estas skribita tuta en la ĉambro, kie oni enbalzamigas la mortintojn. Tio estas granda mistero, kiun konas neniuj ordinara homo, neniu en la mondo.

La libro estos via nutraĵo en la malsupra lando de la spiritoj, ĝi liveros al via animo rimedojn por restadi sur la tero, donos al vi vivon eternan kaj faros, ke neniuj havos povon super vi." [La libro de l' mortintoj, ĉapitro 148-a.]

Oni riĉe vestis la reĝajn restaĵojn, metis oran maskon sur la vizaĝon, ringojn kaj braceletojn sur la krucitajn brakojn. Sub la kapon oni metis eburan apogilon, sur kiu ordinare dormas Egiptanoj. Fine, oni fermis la korpon en tri ĉerkoj: papera, kovrita per surskriboj, orita cedra kaj marmora. La du unuaj estis plene adaptitaj al la korpo de la mortinto; eĉ la skulptita vizaĝo estis simila, sed ridanta.

Post trimonata restado en la kvartalo de la mortintoj, la mumo de l' faraono estis preta al la solena enterigo. Oni ree transportis ĝin en la reĝan palacon.

*Daŭrigota...*



# *Kajeroj el la Sudo*

*Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj*



---

<http://www.gazetoteko.com/hale/kels105.pdf>

---

ISSN 1886-1997 (Reta versio)

ISSN 1886-1938 (Printita eldono)



ISSN 1886-1938 (printita)  
ISSN 1886-1997  
Depósito legal: Z-2398-88